

LA ESPERO

Organ för Esperantorörelsen
i Sverige

Utgiven av Förlagsföreningen
Esperanto u. p. a.

OFICIALA ORGANO POR SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO (S. E. F.)

12a Jaro
N:o 5

Redaktör: HENNING HALLDOR.
Ansvarig utgivare: W. WAHLUND.
Prenumerationspris: Helt år kr. 3:—.
Lösnummerpris: 30 öre.
Annonpris: 10 öre pr mm.
Redaktionens och expeditionens adress
Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1.

Redaktanto: HENNING HALLDOR.
Responda Eldonanto: W. WAHLUND.
Abonprezo eksterlanden: sv. kr. 4:—.
Prezo po numero: 30 oeroj.
Anonprezo: 10 oeroj po milimetro.
Adreso de redaktejo kaj ekspedejo:
Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, Svedujo.

Majo
1924

Varför en engelsman föredrar Esperanto. Ĉu vi legas vian Fundamentan Krestomation?

Det kan ju ligga nära till hands att tänka, att varje engelsman med glädje skulle hälsa ett förslag om engelskans upphöjelse till världsspråk. Att så inte är fallet, veta vi emellertid. Skälen härtill äro väl olika hos olika personer, men de vanligaste och pålitligaste torde innefattas i Mr M. C. Butler's svar på vår fråga: Varför vill ni inte ha engelska till världsspråk?:

Pri la angla lingvo, mi estas certa ke tiu ne taŭgas kiel internacia lingvo. La angla lingvaĵo, kiun ni ricevas de personoj, kiuj supozas, ke ili skribas en bona angla lingvo, estas vere ridiga. Eĉ iu profesoro el Svedujo, Sandström(?), kiu estas profesoro de angla lingvo kaj tre forte kontraŭas Esperanton kaj porpledas la anglan kiel I. L., en mallonga letero al mi faris 15 erarojn gramatikajn kaj literadajn. Li aldonis argumenton por la angla lingvo, verkitan de Zagreba profesoro, kies angla lingvo estis tiel malbona, ke nek mi, nek aliaj angloj, al kiuj mi ĝin montris, povis kompreni ĝin.

Mi pli amas la anglan lingvon, ol voli kuraĝigi ĝian degradiĝon en kodlingvon sen nacia karaktero.

Skribante Esperanton, tamen ĉiu povas esti certa, ke li uzas lingvon tute neŭtralan, kaj esti certa, ke li diras ĝuste tion kion li intencas diri, sen timo pri eraroj kaj miskomprenoj. Por ĉio, tio estas plej bona. kio al ĉi konvenas. Angla lingvo por la anglolingvanoj, Esperanto por la mondo.

Kore via

M. C. Butler.

att tänka, att varje engelsman med engelskans upphöjelse till världsspråk. Att så inte är fallet, veta vi emellertid. Skälen härtill äro de vanligaste och pålitligaste torde svar på vår fråga: Varför vill ni inte ha engelska till världsspråk?:

Vad engelska språket beträffar, är jag säker på, att det icke duger som internationellt språk. Den engelska, som vi få från personer, vilka tro, att de skriva god engelska, är sannerligen löjväckande. Till och med en professor från Sverige, Sandström*), som är professor i engelska och skarp motståndare till esperanto och förespråkare för engelska som världsspråk, har i ett kort brev till mig gjort 15 grammatiska och språkliga fel. Han bifogade ett försvar för engelskan, författat av en professor i Zagreb, vars engelska är så dålig, att varken jag eller andra engelsmän, för vilka jag visat skriften, kunde förstå den.

Jag älskar engelska språket högre än att jag vill befrämja dess degradering till ett telegrafspråk utan nationell karaktär.

Men när man skriver esperanto, kan man vara säker på, att man använder ett alldeles neutralt språk och att man säger just det som man ämnar säga, utan att behöva frukta för fel och missförstånd. För allting är det bäst, som passar bäst. Engelska språket för engelsmän, esperanto för hela världen.

Hjärtligen Eder M. C. Butler.

*) Måne roteman Sandstedt?

Ĉu vi legas vian Fundamentan Krestomation?

Samideano skribas al ni:

Mi ekzercas Esperanton tiel, ke mi laŭtlegas en la "Fundamenta Krestomatio" por ricevi bonan lingvan senton. Mi opinias, ke tio estas la plej bona maniero lerni la lingvon. Mi ankaŭ opinias, ke ni esperantistoj tro malmulte legas nian Fundamentan Krestomation, la libro, kiun la Majstro donis al ni por ke ni havu la saman lingvan senton, kaj tial ĝi estu diligente uzata de ĉiu el ni.

La plejmulto kredas, ke sufiĉas se ili scias la vortojn kaj povas skribi tekston, kiu ne enhavas eraron rilate al la 16 reguloj. Sed tio ne sufiĉas; oni devas aŭdi, ke tiu ĉi estas bona Zamenhofs esprime sed tiu ne.

*

Ni volas nur substreki la ĉi supran vortojn. Fundamenta Krestomatio estu unu el la unuaj libroj, kiujn ni legas lernante Esperanton.

La prezo, 4 kronoj, ne estas tro granda por tiu valorega libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1.

Förlagsfören. Esperantos u. p. a.

hrr andelsägare kallas härmed till årsmöte annandag pingst d. 9 juni 1924 kl. 10 f.m. å Beskowska skolan i Stockholm. Ärenden enligt stadgarna. Styrelsen.

S. E. F:s årsmöte.

Såsom i föregående nummer meddelades hålles Svenska Esperanto-Förbundets årsmöte i Stockholm under pingsthelgen, 7-9 juni. Öppningssammanträdet kommer emellertid ej att äga rum å rest. Gillet, såsom i vårt förra nummer angavs, utan i stället på hotell Kronprinsen, Drottninggat. 29, norra ingången, 1 trappa upp, med början kl. 6 e. m. pingstafton den 7 juni.

Efter öppningssammanträdet vidtager omedelbart soaré, varvid medverkan benäget lovats av fröken N. Borovko från Ryssland, fru Rönberg-Halvorsen (event. med elever), fröken Ilona von Regeczy (eventuellt) m. fl.

Gemensam supé är efter soaréns slut arrangerad. Pris (inklusive drickspengar) 6 kr.

På annandagens eftermiddag kommer en utflykt i skärgården att företagas, troligen med Vaxholm som mål. Avfärden antages kunna äga rum vid 12- eller 1-tiden, återfärden kan företagas efter behag, enär båtar gå så gott som varje timme. För dem som så önska finnes tillfälle att intaga lunch å Vaxholms hotell.

Anmälningar till examen kunna ännu mottagas.

ARSMÖTETS PROGRAM I SAMMANDRAG.

Pingstafton den 7 juni kl. 6 e. m. öppningssammanträde, soaré och gemensam supé.

Lokal: Hotell Kronprinsen, Drottninggatan 29, 1 tr. (norra ing.)

Pingstdagen kl. 10 f. m. S. E. F:s arbetssammanträde.

Lokal: Beskowska skolan, Engelbrektsgatan 9-1.

Annandag pingst kl. 10 f. m. Förlagsföreningen Esperantos årsmöte.

Lokal: Beskowska skolan.

Kl. 12 midd., event. 1 e. m. Utflykt till Vaxholm.

VI PAROLAS pri centmiloj da Esperantistoj. Pruvu ke estas almenaŭ dekmil. UEA bezonas dekmil membrojn. Aliĝu al UEA!

Sveda kroniko.

LA ESPERANTA TRADUKO DE LA PAROLADO DE LA ANGLA REGO EN WEMBLEY. Aŭdante el la elsenda stacio de la tuta telegrafo, ke oni estis redonontaj anglan programon vespere la 23-an de aprilo, mi ĝojis, ĉar mi esperis esti aŭdonta la tradukon de la reĝa parolado. Sed venis nur anglalingva parolado, poste oni diris, ke la programo estis finita kaj mi ricevis, kiel oni diras, longan nazon.

H. H.

En Bengtsfors nia samidano C. Winberg kaj kelkaj aliaj personoj bone aŭdis la paroladon kaj klare komprenis ĉiun vorton.

En Örebro la parolado estis bone aŭdata de s-ro O. Johansson. Li bone komprenis ĉion kaj povis konstati, ke estis la sama elparolado kiel tiu de la Örebro-aj samidanoj.

En Göteborg s-ro Eric Höglund aŭdis la paroladon bone kaj konstatis, ke Esperanto aŭdiĝas multe pli klare en radio ol ekzemple la angla lingvo.

LUDVIKA. Merkrede la 23-an de aprilo kelke da anoj de la Grupo Esperantista de Ludvika per senfadena telefono aŭskultadis la inaŭguracian paroladon de la reĝa moŝto de Angluio ĉe la ekspozicio en Wembley, kiu parolado estis tradukita al Esperanto. Oni aŭskultis aŭdeble kaj komprenis senpene ĉiun vorton.

ÖREBRO. La kurso nun estas finita kaj oni havas anstataŭ ĝi paroladekzercojn. Oni kunvenas ĉiusemajne kaj tiam estas malpermesata la uzado de alia lingvo ol Esperanto.

KRISTINEHAMN. Ĉe la blindula lernejo okazis dum la lasta vintro kurso en Esperanto gvidata de sinjoro Eric Andersson. En la kurso partoprenis ses personoj, kaj la lecionoj okazis en lerneja ĉambro. La estro de la lernejo, s-ro Oscar Thurén, montris intereson por la kurso kaj donis la permeson ĉin aranĝi.

La kurso estis komencita la 17-an de sept. kaj finiĝis per ekzameno la 28-an de aprilo.

GÖTEBORG. Dum la jaro okazis du kursoj, aranĝitaj de Grupo Esperantista de Gotenburgo, unu por progresemluloj kaj unu por novkomencantoj.

La daŭriga kurso komencis en la aŭtuno 1922 kaj daŭris ĝis la printempo 1923. En la fino de oktobro komencis kurso por komencantoj, enskribiĝis 5 lernantoj el kiuj la tuta nombro persistis ĝis la fino de la kurso la 4-an de decembro. Kiel instruistoj oficis K. G. Karlsson, E. Höglund kaj J. Allgurén.

Dum la somero la grupo agitis por Esperanto per afiŝoj, kiuj estis algluitaj en diversaj partoj de la urbo kaj la ĉirkaŭaĵo. Pri la rezultato nenio aŭdiĝis.

Bonega propagandilo.

Ni jam menciis la novajn gazetojn de la Brita Esperantista Asocio. Tiu el ili, kiu celas esti la propaganda organo, The International Language, meritas specialan atenton, ĉar malofte oni trovas tiel lerte aranĝitan gazeton kun enhavo tiel konvinkiga por kredantoj kaj nekredantoj en la mondlingva demando.

En nia lando oni opinias en vastaj rondoj, ke la angla lingvo estas la plej bona mondlingvo. Propaganda gazeto en angla lingvo tial estas pli valora ol tia gazeto en la sveda lingvo, ĉar la kleruloj, kiuj ofte ridas je la artefarita mondlingvo, ĝenerale scias legi la anglan lingvon.

La Stokholma Grupo Esperantista jam mendis kvin ekzemplerojn de The International Language kaj la Federacio mendis aliajn kvin ekzemplerojn, ĉiuj estas dissendotaj al influricaj personoj, kiuj povas havi intereson nor nia afero.

Niaj lokaj grupoj aŭ izolaj samidanoj, kiuj volas varbi klerulon, atentu ĉi-tiun novan propagandilon. Se la ekonomio permesas, ili abonu por la koncernaj personoj unu ekzempleron de la gazeto dum unu jaro.

Personojn, kiuj havas intereson por lingvaj demandoj, oni ankaŭ povas varbi kiel abonantoj.

Partoprenu la jarkunvenon de S. E. F.!



RADIO OCH ESPERANTO.

En radiokonferens ägde rum i Geneve den 22 april. Av 39 representanter behärskade 9 esperanto. Bland dessa återfinna vi namnen Privat, Kreuz, Scholze, Pillik, Isbrücker m. fl.

Flera resolutioner antogs. Av en rapport från engelska radiobolaget framgick, att på sista tiden 40 radioprogram utsänts från 7 länder på esperanto. Detta bevisar dock att esperanto börjat användas som radiospråk, och det skulle vara intressant att veta, om hrr idister, trots sitt myckna tal om att ido är radiospråket, kunna uppvisa en liknande siffra.

DANMARK.

Centra Dana Esperantista Ligo har sitt årsmöte under pingsten i Aarhus. Första dagen ägnas åt nöjen och utflykter, den andra åt sammanträden. Anmälningar om deltagande insändas till s-ro M. Palsberg, Langelandsgade 4, Aarhus.

ITALIEN.

Esperanto har införts såsom valfritt ämne i följande skolor i staden Bari, Italien: Kungl. handelsinstitutet, Kungl. Navigationsinstitutet, Kungl. tekniska institutet, National-högskolan, Ärkebiskopsseminariet, Högskolan Nasuti.

U. E. A:s delegito, läraren A. Calendola, fungerar som lärare i kurserna vid ovannämnda lärosäten.

Al la esperantistoj en Dalarne!

Ni invitas per ĉi-tio ĉiujn esperantistojn en Dalarne partopreni provincon kunvenon en Borlänge dimanĉe la 15-an de junio 1924. Ĉe la kunveno oni diskutos kaj eventuale decidos pri fondiĝo de provinca unuigo de esperantistoj. Plue okazos kantado, muzikado, parolado ktp. Skriban inviton ricevos ĉiuj kluboj en la provinco kiam la programo estos difinita.

La provizora komitato.

Världsspråksproblemet och vetenskapen.

Av läroverksadjunkten
Elias Beckman.

Det fordrades en hel volym att bara uppräknade de viktigaste fördelar, som ett gemensamt vetenskapligt språk skulle innebära. Ett språk, som på varje område skaffade sig en enhetlig, väl genomförd terminologi, som ej grumlades av ordens mångtydighet, ett språk, som alla vetenskapsmän behärskade lika bra, som satte engelsmannen i tillfälle att ur första hand inhämta, vad kinesen, japanen, hinduen, ryssen tänkt och utforskat. Och vad detta "hoptoretiserade" språk skulle betyda för språkforskaren, vilka synpunkter och problem det skulle erbjuda språkfilosofen, vilken ryggrad det skulle skänka åt språkpedagogens arbete, det kan endast den ana, som i några månader eller år studerat esperanto. Och tidsbesparingen på alla litterära och vetenskapliga områden, när man en gång kommit så långt, att alla för internationellt bruk avsedda arbeten skreves på samma språk, endast den är motiv nog för ett allvarligt begrundande och studium av frågan. Därtill kommer, att en författare efter språkreformens fullständiga genomförande ej längre riskerade alla de missförstånd och vantolkningar, som en översättning ger anledning till.

Naturligtvis har konstspråket sin stora begränsning, då det gäller skönlitterära arbeten. Att t. ex. försöka tolka Frödings ordkonst på esperanto vore i många fall ett hopplöst förelag, men man får ej fordra det orimliga. Den rent mästertliga tolkning, som Hamlet fått på esperanto, borgar för, att även på det rent skönlitterära området mästerverk i original eller översättning komma att se dagen. Ett vackert prov på esperantisk verskonst är Sigurd Agrells översättning av Vikt. Rydbergs "Gläns över sjö och strand", som förekommer i den esperantistiska sångboken "Sveda kantaro".

ĈU VI PROVIS VENDI AL VIAJ KONATOJ ESPERANTO-SLOSILOJN?

Kongreskaravano Berlin—Wien.

La delegitaro de "Teritorio de U. E. A. Berlin" aranĝos kongreskaravanon de Berlin al Wien. La karavano ekveturos el Berlin la 5-an de aŭgusto per rapidtrajno trans Dresden-Prag. La tuta vojaĝo daŭros ĉ. 15 horojn.

Estas intencite, elvagoniĝi en Prag kaj resti tie ĝis la proksima mateno.

La kotizo por aliĝontoj (germanoj kaj negermanoj) de la karavano estas po 1 germ. ormk. (0,25 USDolaro aŭ egalvaloro) inkl. kosto de la por ĉiu rezervota sidloko.

Kiu volas aliĝi, anoncu sin tuj al la subskribinto kaj sendu samtempe la kotizon. Anoncu sen kotizo estas senvalora. Tiuj, kiuj volas veturi kun la karavano nur ĝis Dresden, povas ankaŭ aliĝi, sed ili estas petataj menciitaj speciale. La kotizo estas la sama.

Pluaj sciigoj sekvos.

Skribu nepre legeble viajn nomon kaj adreson.

Max Blankenheim
Ĉefdelegito de U. E. A. en Berlin.
Berlin-Steglitz.

Sciigo al infanoj lernantaj Esperanto!

Ĉu vi deziras korespondi kun geknaboj de Germanlando? Se vi volas komenci kaj serioze daŭrigi, sendu tuj vian adreson kaj apartajn dezirojn al ni. Instruistoj volu sciigi, ĉu vi deziras korespondadon inter klasoj. Ni zorgos senkoste pri tutcerta kaj konstanta respondado. Se vi ne estos kontentaj, plendu ĉe ni.

Volonte ni laboras por vi, karaj infanoj, do donu al ni laboron!

Salutas vin

Tutmonda Lerneja Servo.
Sidejo: Falkenstein i. Vgtland
(Germanio) Feldstr. 18.
R. Pfütze.

ĈU VI DEZIRAS, ke UEA vivu kaj prosperu? Se jes, pagu kiel eble plej baldaŭ vian kotizon de Membro-Abonanto. Se vi estas favorito de l'sorto aliĝu kiel Membro-subtenanto aŭ kiel Membro dumvivanta. UEA bezonas vin!

Libroj kaj Gazetoj.

ALBRECHT DÜRER. Vivo kaj verkado de la fama pentristo. 28 bildoj pri liaj verkoj kun biografio kaj klarigoj de Hans Koch, München. Sudgermana Esperanto-Eldonejo Oskar Ziegler, Deisenhofen bei München. Prezo: germ. ormarkoj 1:40.

La produktado de Albrecht Dürer jam estas konata de la esperantistoj dank' al la vere arta albumo de s-ro Nüchter. Tiu ĉi albumo estas multe pli malgranda, sed tamen ĝi estas bela.

DATA OCH FAKTA RÖRANDE FREDSRÖRELSEN (Datoj kaj faktoj pri la pacmovado) de Anna T. Nilsson. Distribuas: A.-B. Cronqvists Bokhandel, Malmö. 52 paĝoj, prezo 0.95.

Sur duona paĝo la helplingva ideo estas menciita. Kiel la ĉefa aspiranto al la rango de internacia helplingvo estas citita Esperanto.

VÖLKERSPIEGEL. Eldonanto: Presse-Kommission Leipziger Arbeiter-Esperantisten. Redaktoro: Otto Bässler, adreso Gerberstrasse 24, Leipzig. Duonmonata gazeto en germana lingvo enhavanta novaĵojn k.t.p. el ĉiuj landoj. La formato granda.

SOLANDRO. De Waldem. Bon-sels. Tradukis d-ro Edm. Sos. Nova Biblioteko Esperanto n-o 2. Eldonanto Paul Knepler, Wien. 48 paĝoj.

INTERNACIA RADIO-REVUO. Eldonita de Radio-Servo, Locarno, Svislando. — Aperas ĉiumonate en granda formato.

Tiu nova gazeto por "radiuloj" enhavas sur siaj ok paĝoj tekston en angla, franca kaj germana lingvo krom Esperanto. La lasta lingvo okupas la duonan spacon.

El la artikoloj en ĝia unua numero ni citas: Universala Radio-Patento. Radia telefonado. Esperanta Radio-Prezentado. Radio and the Language difficulty.

Fidinda radiogazeto en Esperanto multe utilos al nia afero kiel ankaŭ al la radiuloj-esperantistoj, tial ni deziras al la nova gazeto bonan progreson.

Abonojn akceptas Eldona Soc. Esperanto. Prezo 5 kronoj por tuta jaro.

Radio och Esperanto är frågan för dagen!

Prenumeration à INTERNACIA RADIO-REVUO emottages. Pris 5 kr. pr helår. Utk. månatligen, 8 stora sidor text, hälften på Esperanto och hälften på tyska, engelska och franska. Prenumerera redan i dag och första numret erhålles omgående.

FÖRLAGSFÖREN. ESPERANTO u. p. a., Stockholm 1.

Den bästa propagandan för Esperanto

presterar Brittiska Esperanto-Förbundets nya tidning THE INTERNATIONAL LANGUAGE.

Utkommer 1 gång i månaden. Helt på engelska språket. Pris pr år kr. 2:50. Prenumeration mottages av Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1.

Fundamenta Krestomatio

bör finnas i varje esperantists bibliotek. Pris kr. 4:— plus porto 0:40. Rekvirera den redan i dag!

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO Stockholm 1.

Från Expeditionen.

De ombud, som i lager ha Bildotabuloj samt esperantostjärnor, vanliga gröna samt med inskrift "Esperanto", nålar, samt miniatyrstjärnor, nålar, bedes återsända dessa så vitt de ej kunna säljas inom närmaste framtiden.

NYTT OMBUD FÖR FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a.

Linköping:
John Svensson, Snickareg. 20.

Svenska Esperanto Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1

har till uteslutande ändamål det mellanfolkliga hjälpspråkets utbredande och befrämjande.

Årsavgift för fristående medlemmar kr. 5:00 inberäknat prenumerationsavgiften för La Espero.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

(Eldona Societo Esperanto s. p. r.)

Adress: Stockholm 1

tillhandahåller all slags esperanto-litteratur, utgiver La Espero. Prislista och provnummer sändes gratis och franko.

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet.

Adress: Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1,

utkommer en gång i månaden. Prenumerationspris inom Sverige 3:00. Annonnspris 10 öre pr mm.

Prenumeration å veckotidningen

ESPERANTO TRIUMFANTA

mottages för Sverige av Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1. Pris 1/1 år 12:— sv. kr., 1/2 år 6:—, 1/4 år 3:—

Insänd ett belopp efter råd och lägenhet, så sändes tidningen så länge pengarna räcka.

PRISLISTA

å vårt goda sortiment av esperantolitteratur sändes på begäran gratis och franko.

Enda inköpskälla i vårt land.

Förlagsföreningen Esperanto u.p.a. Stockholm 1.

Esperanta Librejo

(Papervendejo) Malmskillnadsg. 34, Stockholm (apud Hamngat.). Tel. Norr 119 89. Faru viziton! Granda sortimento de esp. literaturo.

Georg F. Klefe

Speditör

Lübeck - Tyskland

rekommenderar sig för utförande av alla uppdrag i branschen. Korrespondens: Esperanto, svenska, tyska.